

Wilhelm Müller,
 Ĉe put' antaŭ pordego
tradukita de Joachim Gießner

Ĉe put' antaŭ pordego
 jen staras la tili'.
 En ĝia ombro dolĉe
 ja ofte revis mi.
 Mi tranĉis karajn vortojn
 en ĝia kruda ŝel'.
 En ĝojo kaj doloro
 ĝi restis mia cel'.

Mi devis pretermigri
 dum nokta obskurec'.
 Mi fermis la okulojn
 en nigra malhelec'.
 Kaj kvazaŭ min vokante
 la branĉoj muĝas jen:
 "Ci tien vi nur venu
 kun via korĉagren'."

Malvarma vento blovís
 dolore kontraŭ mi.
 De l' kap' ĉapel' forflugis,
 ne turnis mi al ĝi.
 Nun malproksima estas
 mi for de la tili',
 sed vokas ĝi: "Nur venu,
 tankvilon trovos vi!"

Wilhelm Müller,
 Der Lindenbaum

Am Brunnen vor dem Tore
 Da steht ein Lindenbaum
 Ich träumt in seinem Schatten
 So manchen süßen Traum
 Ich schnitt in seine Rinde
 so manches liebes Wort
 Es zog in Freud und Leide
 Zu ihm mich immer fort

Ich mußt auch heute wandern
 Vorbei in tiefer Nacht
 Da hab ich noch im Dunkel
 Die Augen zugemacht
 Und seine Zweige rauschten
 Als riefen sie mir zu:
 "Komm her zu mir, Geselle
 Hier findst du deine Ruh."

Die kalten Winde bliesen
 Mir grad ins Angesicht
 Der Hut flog mir vom Kopfe
 Ich wendete mich nicht
 Nun bin ich manche Stunde
 Entfernt von diesem Ort
 Und immer hör ich's rauschen:
 "Du fändest Ruhe dort."

Wilhelm Müller,
 La tilio
tradukita de Ludwig Emil Meier

Ĉe l'puto antaŭ l'urbo
 Jen staras la tili',
 En kies ombro dolĉe
 Revadis ofte mi.
 En ĝia ŝel' tranĉite
 Vidiĝas ama dir',
 Kaj daŭre min altiras
 Al ĝi la korsopir'.

Hodiaŭ, ĉe noktmezo
 Mi pasis ĝin, migrul',
 Ho! Spite la malhelco
 Fermiĝis la okul'.
 Sed ĝiaj bonaj branĉoj
 Alvokis ŝajne min:
 "Alvenu, ho junulo,
 Ni repacigos vin!"

Alblovís vent' malvarme
 Kun granda energi',
 Ĉapelon ĝi fortiris,
 sed ne turniĝis mi.
 Kaj nun, post kelka mejlo
 De interspaco, ho!
 Ankoraŭ bruas l'arbo.
 "Ce mi paciĝu do!"

...

...

...

*Traduko de la Germana poemo “Der Lindenbaum” de WILHELM MÜLLER (*1794-10-07 – †1827-10-01) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25) en 2001-11.*

Arg-83-165 (2003-12-28 22:58:15)

Tiu ĉi traduko troviĝas en la kantlibro “Mia kantaro I”, kiun eldonis JOSEF SCHIFFER (Wilstorferstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio) en 2001.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas WILHELM MÜLLER (*1794-10-07 – †1827-10-01), publikigita 1822.*

Arg-83-163 (2003-12-28 22:57:42)

*Mi trovis tiun originan version en la TTT sub [http://
ingeb.org/Lieder/AmBrunne.html](http://ingeb.org/Lieder/AmBrunne.html)*

*Traduko de la Germana poemo “Der Lindenbaum” de WILHELM MÜLLER (*1794-10-07 – †1827-10-01) en Esperanton de LUDWIG EMIL MEIER (*1847-02-16 – †1919) en 1907.*

Arg-83-166 (2014-05-31 14:26:54)

Tio estas la origina tradukversio de L. E. MEIER. Ĝi troviĝas en la kantlibreto “Esperantista Kantaro”, kiun eldonis HANS TH. HOFFMANN en 1907 en sia eldonejo en Berlino, Steglitzer Str. 44. Tiu ĉi esperantigo troviĝas ankaŭ en http://kantaro.ikso.net/la_tilio. Vidi ankaŭ: <http://194.95.59.225/index.php?id=3623>.